

## La Kongreseto de la Blinduloj en Cambridge.

Grandan ĝojon alportis la Kongreso Cambridge'a al la dudek unu blinduloj, kiuj ĉiutage kunvenis en sia propra hejmo : dormejo, manĝoĉambro kaj salono, 3 Market Hill. Ne nur ĝojon ĝi alportis al ili kaj gajajn, tre gajajn kunvenojn — oni multe kantis, muzikis kaj eĉ dancis ce ni — sed ankaŭ kaj precipe veran utilon kaj profiton.

La tie ĉi kolektitaj blinduloj apartenis al sep diversaj nacioj. Ili venis el Anglujo (6), Francujo (5), Germanujo (1), Svedujo (2), Danujo (1), Svisujo (2), Holandujo (1) kaj Nord-Ameriko (3), sume : ses sinjorinoj kaj dekkvin sinjoroj. De la unua horo, kun sincera kortuŝeco, ili konstatis, preskaŭ surprize, kiel facila por ili estas la interkompreniĝo, kvankam multaj neniam antaŭe estis uzintaj buŝe la karan lingvon. Kiel diris tre ĝuste mia bonega amiko P. Corret : *tiu kongreso estis al geblinduloj ilia Boulogne'a Kongreso!*

Multajn interesajn specialajn temojn ili diskutis kaj priparolis : la mallongigojn en braila skribado, la uzon ĉiam pli vastan de *nia eŭropa* braila sistemo en Ameriko — por la angla lingvo kiel por la esperanta (1) — la kreadon de internacia rondiranta biblioteko en reliefpunktoj, la enkondukon de Esperanto en problindulajn lernejojn k. t. p. Sed antaŭ ĉio ili persone konatiĝis kun preskaŭ ĉiuj plej famaj blindaj Esperantistoj kaj interligiĝis per frata, daŭra amikeco.

Tia kongreseto estis absolute necesa kaj ne eble estis ĝin pli longe prokrasti. Sen dubo ĝi multe helpos al la estonta disvastigado de Esperanto inter blinduloj. Dank' al ĝi multaj senefikaj klopodoj estos evitataj, multaj bonaj rimedoj estos uzataj. Tamen, tre versaĵne — kaj tion tre klare antaŭvidis la organizintaj de la kongreso de la blinduloj en Cambridge — ni ne plu havos *tian* kongreson, tial ke *tia* ne plu estos

---

(1) *Teorie* la Amerika sistemo estas eble pli logika, pli bona (D-ro Javal ĝin aprobis, sed, *praktike*, kiu estis la rezultato de la akcepto de « plibonigita » sistemo en Ameriko? Ke nun Anglaj kaj Amerikanaj blinduloj, kiuj skribas saman lingvon, tute ne povas korespondadi! *En interrilata afero la ĉefa, plej grava eco estas plena interkonsento.* Plibonigo, kiu detruas ĝin estas nur *teoria* plibonigo, ĝi estas *praktike* la malo. Grava ekzemplo por ni Esperantistoj!

necesa. En estonteco niaj blindaj samideanoj venos *persone* ne plu *are* : ili estos kondukataj de persona amiko aŭ de sia grupo, kiu zorgos por ilia vojaĝo kaj ilia vivado en la kongresurbo. Ili ne plu kuniĝos en speciala kongreseto, sed, kiel ĉiuj aliaj esperantistoj, partoprenos en la kongreso mem. Se ili havas (kaj certe ili havos) specialajn kunsidojn, tio estos kiel aliaj fakuloj : jurnalistoj, scienculoj, dentistoj k. t. p.

Tiel opiniante, kaj kun plena aprobo de ĉiuj ĉeestantaj blinduloj, ni prezentis, S-ro A. J. Adams, F-ino Zabilon d'Her kaj mi, en ĝenerala kunsido de la kongreso, jenan deziron :

*« Ke ĉiu grava esperantista grupo adoptu, kiam tio « estos ebla, blindulon aŭ blindulinon, provizu lin per libroj « esperantaj braille skribitaj kaj faciligu al li ĉiumaniere « la lernadon kaj la praktikon de Esperanto! »*

Se, plie, ia grupo volas kaj povas helpi al blindulo, por ke li venu en niajn kongresojn, tio estas bonega kaj tute laŭdinda. Tion ni tiflofiloj (1) tre deziras.

Dankaj ni estas, tre dankaj al ĉiuj, kiuj per sia mal-avareco antaŭ aŭ dum la kongreso alportis al ni tiel gravan monan helpon, ke ni fine havis da mono pli ol ni bezonis por la kongreso mem...., nur en la ekspozicia kesteto ni metis aŭ trovis pli ol 400 frankojn!

La restaĵoj ni utiligos tiamaniere : tio, kion oni kolektis en Francujo estos difinita por franca-esperanta braila vortaro, en Anglujo por angla-esperanta braila vortaro, en Germanujo por germana-esperanta braila vortaro (2).

Dankinte tiujn, kiuj mone subtenis kaj ankoraŭ subtenos nin, mi ne devas preterlasi tiujn, tre multajn, kiuj morale nin kuragigis. Dankon mi ne rajtas diri al nia bonfaranta feino, F-ino Zabilon d'Her, nek al S-ro A. J. Adams, ili estas ja amikaj kaj ĉiamaj kunlaborantoj, sed dankon, koregan dankon mi diros al nia kara Majstro, kiu tiel ĝentile venis en nian hejmon kaj babiladis kun ĉiuj blinduloj, al S-ro de Beaufront, al S-ro Boirac, al S-ro Clarence Bicknell, al S-rino Guivy, al « fileto » Privat, al nia fama Trio kaj al

(1) Tiflofilo = amiko de la blinduloj.

(2) Flanke de multaj motivoj, kiuj igas la blinduloj speciale interesantaj inter aliaj kripluloj, tiu ankaŭ devas pliigi nian kompatemon, ke ili tute ne povas uzi *niajn* librojn, sed bezonas specialajn tre multekostajn.

ceteraj vizitantoj ; dankon al S-inoj Raffard, el St-Chamond, kiuj estis sindonaj patrinetoj de la blinduloj dum la tuta Kongreso, al F-ino Vanney, el Genevo, tre afabla kondukantino en Cambridge kaj dum la vojaĝo, fine al la modestaj geservistoj de 3 Market Hill, kiuj kortuŝante klopodis por plifaciligi al niaj geblinduloj la vivadon en angla lando.

Al ĉiuj je la nomo de la blinduloj varman dankon !

Kaj nun, karaj, samideanoj, ne dubu, ke, helpante la blindulojn, vi multe helpos al ĝenerala disvastigado de Esperanto en la mondo !

TH. CART.

---

## MOVADO ESPERANTISTA

---

Dum la somera liber- aŭ kongres-tempo la vivo esperanta, eliĝinta for de la diversaj nacioj, tute koncentriĝas en la lando kaj la urbo, kie okazas nia jara Kongreso. Oni do pardonu al ni, se nia kroniko estas hodiaŭ iom malplena : la kulpo ne estas nia.

### FRANCA

Kursojn oni ne faras dum Aŭgusto, nek ekzamenojn, nek paroladojn. Eble oni trovus sindonemajn profesorojn, sed lernantoj kaj aŭskultantoj mankas. Tamen oni « esperante » laboras, oni terure laboras ĉe la eldonistoj, kiuj deziras sendi al kongresa Ekspozicio belajn, freŝe bakitajn verkojn. La firmo Hachette, kiu en tiu laŭdinda konkurso konservas la unuan lokon, donas al ni « Faraonon », de Kabe, vere *reĝan* donacon ; la Presa Esperantista Societo, pli modesta, prezentas al legantoj gravan « Leksikonon naŭlingvan » de S-ro Bastien, kaj tute ravan « Belulinon », al kiu S-ro Bach-Sisley, en traduko de S-ro Touchebeuf, rakontas plej ĉarmajn noveletojn. — La 29. Septembro la « Amicale Espérantiste de Paris » faros promenadon en Chaville, je la honoro de kelkaj junaj samideanoj, kiuj tre baldaŭ *soldatiĝos*. La esperantan parolon ili certe disvastigos